

I N F O R M A B U L T E N O
de la Esperantista klubo en B r n o .

N-ro 14.

Februaro 1933.

Por la membroj la Bulteno estas senpaga, sed ĉiu estas petata doni libervole ian sumon, por kovri niajn elspezojn. Kiu deziras poŝte ricevi la Bultenon, devas pagi almenaŭ la poŝtelspezojn.

Idealismo kaj realismo .

La demando, ĉu idealismo au realismo estas pli defendinda, interesas speciale nin Esperantistojn. Oni nin multe mokis kaj eĉ hodiaŭ ankoraŭ nin mokas, ke ni estas strangaj idealistoj, nenion komprenantaj pri la aferoj de tiu ĉi mondo. Je tio ni respondis: "Jes ni estas idealistoj kaj ni estas fieraj pri tio, ni volas fari la mondon libera". Obstine kaj ofte malespere ni luktis kontraŭ la "realismo". Kio nin disigis de la alia, tiu reala mondo? Ĉu io vere esenca? Mi kuraĝas diri, ke ne. Nur nekompreneo nin disigis kaj ankoraŭ disigas. Idealisto estas homo, kiu sekvas ideon, celon utilan. Realisto estas homo, kiu agas laŭ la eblecoj, do kiu ne provas kuri tra muroj. Analizu tiujn ĉi du difinojn kaj vi tuj komprenos, ke oni devas esti kaj idealisto kaj realisto. Oni devas esti idealisto, ĉar homo sen utila ideo aŭ celo ne povas havi veran ĝuon de ĉi tiu mondo. Tia homo vivas nur kiel besto, tute laŭ siaj instinktoj. Sed aliflanke, ĉu oni povas efektiviĝi ideon, celon alie ol laŭ la eblecoj donitaj? Ne, idealisma movado estas efektivebla nur sur reala bazo kaj sekve la vera idealisto estas ĝisoste realisto. Esperantisto, kiu per tro laŭta kaj brua propagando ridindigas Esperanton, neglektas la realajn eblecojn kaj sekve pli domaĝas al nia movado, ol li utilas. Aliflanke tiu, kiu utiligas Esperanton kaj uzas ĝin por realaj celoj plej multe helpas la disvastigon de nia lingvo. Ni agu do realisme kaj samtempe konservu nian idealismon, kiun ni ja ne sentas kiel ŝargon, sed kiel celon de nia ekzistado, kaj per tiu nia reala idealismo ni vere la mondon faros libera. E. S.

2.

El la kluba vivo.

Memoru bone! Kunvenoj de brnaj esperantistoj okazas regule ĉiumarde je la 20-a en bela klubejo / box 1 / de hotelo Passage.

Libra ekspozicio. Ĝi daŭre troviĝas en nia klubejo. Tiel estas al vi eble ne nur konatiĝi oportune kun rimarkindaj k. interesaj verkoj de l' esp. literaturo, sed eĉ ekposedi facile ilin. Prezoj esas tre avantaĝaj k. certe vi plezuros k. fieros, havante tiel malkare belajn k. valorajn librojn. Ni ekspozicias ĉiujn eldonaĵojn de la Literatura Mondo, Ekrelo, Japana Esperanto-Instituto k. tre baldaŭ ankaŭ de Heroldo de Esperanto k. a. esp. entreprenoj. Pri ĉi tiu nova kluba servo estas konstante granda intereso, gvidas ĝin zorge s-ano Poláček.

Parolado de s-ro Bleier. Eldonanto de la Literatura Mondo, s-ro Bleier el Budapeŝto, parolis la 29./11. 32 pri esp. literaturo, ĝiaj eminentaj nuntempaj reprezentantoj k. iliaj ĉefaj verkoj. Ankaŭ li pritraktis la problemon de neologismoj / favoras ilian uzadon k. aprobon /; krom tio li rakontis epizodojn el la vivo k. pri kutimoj de kelkaj esp. poetoj k. verkistoj. Lia samtempa libra ekspozicio tre plaĉis, surprizis k. instigis multajn ĉeestantojn al aĉeto de esp. libroj.

Amuza vespero / 16./12. 32 /. Ĝi bonege sukcesis laŭ vizito, programo k. financa rezulto. Elekto de la spegulsalono en hotelo Passage estis tre feliĉa. Nur parte ni mencias la feston. Kore bonvenigis ĉiujn s-ro prez. Baĉura, s-ro Hoffner trafe pritraktis la rolon k. vojon de Esp. Li ankaŭ montriĝis bonega reĝisoro de la 2 akta komedio "Gasto", dum kiu eminentiĝis per lerta k. artisma aktorado

s-ino Adamcová, f-ino Ondráčková, bulgara s-ano Nedkof, s-roj Nečas k. Bečan. Majstre violonludis s-ro Mašek k. dum paŭzoj bone koncertis orkestro. Kantis ĥoro de Kat. esp. klubo k. lernantoj de s-ro instr. Jeřábek. Kompleta libra ekspozicio estis plaĉe aranĝita de s-ano Poláček.

Ĝenerala kunveno de nia klubo okazos dimanĉe la 5./3. je la 9-a en hotelo Passage.

3.

Kurso de Esp. Nova kurso por komencantoj komenciĝos la 28.2. k. 7./3. en la lernejo sur Veveří 28, je la 19-a. Kurspago Kč 20.-

V.

El la movado.

Ĉeĥoslovaka numero de Literatura Mondo. La Decembra n-ro de L. M. estis ekskluzive dediĉita al ĉeĥoslovakaj literaturo, pentroarto k. skulptarto. La jenaj aŭtoroj estas tie reprezentitaj: J. Vrchlický, K.J. Erben, J.S. Machar, K. Toman, Z.Rón, J. Wolker, J.Š. Baar, Št.Krčméry, J. Hašková, J. Vrba, K. Čapek, E. Lešehrad, E. Valenta, B. Vlček, M. Jensenová; studo pri Masaryk de E.Ludvig. La jenaj pentristoj ĉeĥaj: J. Mánes, M.Švabinský, Fr. Podešva, J.Obrovský, Preisler, J. Čermák. Skulptistoj: J. Štursa k. O. Gutfreund.

La enhavo, aranĝo, ilustraĵoj estas unuarangaj. Nepre havigu al vi ĉi tiun n-ron. Prezo Kč 6.-

V.

Oni preparas por vi. En la nordbohemia banloko Lázně Bělohrad oni preparas duan Internacian libertempejon. La unua estis aranĝita en 1931 kaj finiĝis kun tre bona rezulto. En Bělohrad kunvenis multaj geesperantistoj el eksterlando. Ni nomas nur s-ron d-ron Sievers, germanan eksministron de kulto kaj d-ron Domec, kuraciston el Hindo - Ĥinuĵo. La dua Internacia libertempejo okazos en monatoj Julio - Aŭgusto kaj estos parte financata de la loka komunumo. Baldaŭ aperos esp. gvidlibretoj tra Lázně Bělohrad kaj tra ĝia rava k. trankvila ĉirkaŭaĵo. En venonta n-ro ni represos detalojn pri ĉi tiu subtenenda esp. entrepreno.

Š.

La tragedio en cikonia nesto . / Daŭrigo./

/Cikonia paro vivis en trankvila familia feliĉo. Iun tagon subite okazis inter ili akra disputo, cikonio kunvenigis aliajn cikoniojn kaj kune ili pikmortigis malfeliĉan cikoniinon./

Tiun ĉi tragedion sekvis preskaŭ la tuta vilaĝo kun granda intereso kaj ĉiuj, tuj kuris al la loko, kie demetis la cikonio malgrandan plumkovriton. Je grandega surprizo ĉiuj eksciis, ke tio estas, anstataŭ cikoniido, meleagrino. Nune la vilaĝanoj klarigis al si la tragedion en la nesto. La cikonio rimarkis, ke estas io fremda en la nesto ĉe ili, kaj pro tio faris tian skandalon. Li kunvokis aliajn cikoniojn kaj post nelonga diskuto estis la cikoniino kondamnita al morto. La verdikto estis tuj plenumita. La vilaĝanoj esploris, kiel venis tiu meleagrino en la cikonian neston. Post kelkaj tagoj unu el vilaĝaj knaboj konfesis, ke li suprenrampis, prenis unu ovon el la nesto, kaj enmetis alian, kiun havis lia patrino hejme. Li volis scii kion elkovos la cikoniino, kaj kiel ĉio finiĝos. Nune li tion scias: estis elkovita meleagrino, la cikonio mortigis pro ĵaluzo sian edzinon, la entrudulo estis forigita kaj la gazetoj havis tragedian historieton.

Tradukis M. Adamcová.

La Bulteno aperas kelkfoje dum jaro, laŭ bezono."

Redaktoro: Sonnenfeld . Eldonanto: Esperantista klubo, Brno, Veverí 28.

La jarkunveno de Ĉ A E okazos la 19./3. en Hradec Králové . Pro grava programo via ĉeesto nepre necesa .

Přepsal Miroslav Malovec, 10.4.2014